**NIA VOĈO**
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas: Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es **DECEMBRO 2010**

LA LICEO AĈETIS POŜKOMPUTILON KAJ PROJEKCIILON

Parte pagate per la subvencio ricevita el la Urbodomo, uzota premiere en la Zamenhof-Festo okazonta la dimanĉon 12an (vidu sube).
– Komputilo HP I3-350; 4GB; 500GB; Intel HD W7
- Projekciilo: LG HS200G; PROYECTOR LED ULTRAPORTAT
- Ruliĝebla surfaco (ekrano) 50"

VIZITIS MADRIDON …

La elstara esperantisto Ferriol Macip, Farri, tre aktiva en Kataluna E-Asocio kaj muzikanto (violono) en la grupo Kaj Tiel Plu. Kelkaj madridanoj renkontiĝis kun li la sabaton 4an en centra kafejo.

EN HISPANIO

La klientoj de la ŝparkaso Caja Navarra povas elekti projekton pri E-kursoj por dediĉi al tiu celo parton el la profitoj kiujn obtenas Caja Navarra pere de la rimedoj de la kliento. Temas pri la senpagaj ĉeestaj kursoj farataj en la sidejo de Fundación Esperanto en Zaragoza.
Do, klientoj de tiu ŝparkaso povas elekti kaj apogi jenan projekton:
Numero: 22001
Projekto: Cursos de esperanto
Institucio: Fundación Esperanto

Informis Lorenzo Noguero

ESPERANTA LOTERIO

La E-Grupo de Bilbao lanĉis loteri-kvitancojn, tute en Esperanto. Ĉiu kvitanco kostas 3,00 eŭrojn, el kiuj oni ludas 2,50 eŭrojn (0,50 restas kiel mondonaco por la E-Grupo).
Se vi deziras aĉeti ilin, necesas unue enkontigi la monon en nia konto de BBK, numero 2095-0141-41-2218001550, je la nomo de "Grupo Esperantista de Bilbao". Tuj sekve, informu tion al la retadreso: jesusmiguel.garcia (ĉe) ehu.es
Post ricevo de la mono, ni sendos al vi, per ret-poŝto, atestilon de la aĉeto, kun la numeroj de la kvitancoj aĉetitaj.

Jesús Miguel García Iturrioz,
Sekretario de la E-Grupo de Bilbao

TRA LA MONDO

**Esperanto sur la Silka Vojo**

La Komisiono de UEA pri la Meza Oriento kaj Norda Afriko invitas al la 4ª Mezorienta Kunveno, kiu okazos en Karaĝo (Irano) 25–29 mar 2011. La temo de tiu ĉi pionira aranĝo de UEA en Irano estos *Esperanto sur la Silka Vojo*. Ĝi estigos eblecon renkonti samideanojn el diversaj landoj en la Meza Oriento, interkonatiĝi, diskuti gravajn kaj interesajn temojn kaj ankaŭ iomete turismumi en la gastiga lando.
Reta aliĝilo, informoj pri la kunveno kaj pri loĝado, kaj aliaj detaloj ĉe www.arabujo.org/mk/2011/starto.php.
Kaze de problemoj aŭ demandoj oni povas turni sin retpoŝte al mezorienta.kunveno (ĉe) esperanto.org.
GK UEA, pere de La Ondo – decembro

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

**Zamenhof-tago**

MEL proponas al vi festi la ĉijaran Zamenhof-tagon la dimanĉon 12-an de decembro. La loko estas la ludo-klubejo "da2", en la strato San Luciano 4, metrostacio Ciudad de los Ángeles. Ni renkontiĝos tie por kultura, amuziga kaj frata kunveno, kiu komenciĝos je la 13-a horo, daŭrigos per komuna manĝado en la ejo, plilongiĝos per postmanĝa babilado, kaj finiĝos per esperantaj amuzaĵoj (ne pli malfrue ol la 19-a horo).
La kosto de la tuto estos la plej malalta el la historio: nula. Pri la luado de la ejo zorgos MEL. La manĝado estos memserva; kiu povos, tiu alportu ion por la komuna tablo.
Rezervu do la tagon kaj la horon. Vi jam povas diskonigi al viaj amikoj, komencantoj, simpatiantoj kaj malnovaj esperantistoj.
Kaze de problemoj por trovi la ejon, telefonu al 647 669 726.

PROVIZORA PROGRAMO
13:00 Akceptado; bonvenigo fare de prezidantoj de MEL kaj de HEF
13:15 Malfermo de Libroservo. Ludoj. Kurseto por komencantoj
13:45 Prezentado de novaj libroj kaj alia materialo
14:15-16:15 kuna manĝado + babilado
16:15-16:30 (purigado)
16:30 Poezia festivalo + kantado (ĥora prezento)
17:00 Peĉakuĉo
17:45 Filmo
18:45-19:00 (ordigado+purigado+adiaŭo)

Cetere, la konversaciaj rondoj okazos normale la tagojn 13an kaj 20an; ne la 27an nek la 3an de januaro; jes la 10an kaj sekvajn lundojn.
Ĝenelala Kunveno la 27an de januaro.
*************************************************************************

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID